



PENSEO

N-ro 126

Marto/2002

Monata Beletro Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 www.anteo.domainvalet.com

Bai Juyi (772--846)

KANTO RENKONTIĜI

KUN BIVISTINO

tradukita de **Lu Jixin**

Aŭtun-nokte ĉe river',
Bonforigo sub acer'.

Mi sur ŝipon de iron't',
Tosti sed sen muzik-son'.

Ĉe adiaŭx, trist-ebri',
Akve fridas lun-falcil'.

Biv' eksonas sur ond-mol',
Mi ne borden, gast' ne for.

"Kiu ludas?" softas mi.
Ŝajne eĥe haltas tril'.

Ŝip' ĉe ŝipon por koniĝ',
Lampojn ordi! Vinon bis!

Post vokad' elvenas ŝi,
Vangon ŝirmas sed per biv'.

Per tri plukoj por agord'
Emocio jam el kord'.

Sombraj triloj kun amar',
Kvazaŭ ĝemas pri fatal'.

Brov-kliniĝe improviz'

Verŝas fluon de sopir'.

Tanĝi, froti, pinĉ' kaj pluk'.
Bel-muzikoj vice lud'.

El dik-kordoj – rumor-pluv',
El maldikaj – kver-murmur'.

Kver', rumoro, miksludad' –
perla pluvo al jada plad'.

Oriola kant' ĉe flor',
Subglacie fonta plor'.

frostas font', rompitas kord'.
Kord' rompita sen sonor'.

Mute fluas trista sent',
Sorĉas pli ol son' silent'.

Krevas arĝent-vaz' kun akv'.
Sturm' rajdista, tint' de glav'.



Filme plektri por final'.
Kvak' silk-ŝire el kord-kvar'.

Ŝipojn kovras nun silent'.
nur susuras lun-arĝent'.

Plektron metas korden jen,

Ŝi stariĝas kun pensem'.	kun malsan' mi restas ĉi, En dezerto sen muzik'.
Ekprezentas pri si mem: "En ĉefurbo estis hejm'..."	Loĝas mi en river-val'. Ĉirkaŭ domo fragmitar'.
Dektri-jara mi en trup' Diplomitis je biv-lud'.	Kio ĉiam al orel'?' Kukol-plor' kaj simil-blek'.
Mia lert' – elit-fascin'. Mia ĉarm' – envi' de in'.	Lun' aŭtuno, flor' printemp'. Drinkis sola mi kun ĝem'.
Ĉe mi dandoj en konkur', por ari' silk' sen kalkur'.	Ĉu sen kant' sovaĝaj flut'?' Sed la sonoj – knara sput'!
kombil-rompis taktobat'. Jup-makulis vino-fal'.	Dank' al vi kaj bel-arpeĝ', Orel-ravas sorĉa freŝ'.
Glate pasis rava jun', tra printemp', sub aŭtun-lun'.	Residiĝu ludi re! Mi kant-verkos por vi jen.
Frato armen, for onklin'. de mi svenis jun-karmin'.	Post long-staro kun silent', Ŝi repinĉas en krescend'.
Mutas pord' sen ĉar' en frisk'. Edziniĝ' al komercist'.	Frosta ol ĵus ali-tril', Tuŝas ĉiun ĝis plor-spir'.
Al li gravas mon' ol am'. li monatojn for por var'.	Kiu plej kun trista svarm'?' Mi, la rob-trempit' de larm'."

restas sola mi sur ŝip'.
Fridas akve luna vibr'.

Nokte sonĝe jun-memor'.
ŝminkon fuŝas larva roj'."

Por biv-ludo mi jam ve,
por rakonto ĝemas re:

"Samvagante en ŝim-mond',
Frendaj malu ĉe renkont'!

De lastjare, de ĉefurb',
Min elpelis degrad-skurĝ'.



EL «LAŬZI»

ĈAPITRO 45

(Laŭzi pensas, ke ekzistas multaj aferoj, kiuj ŝajnas malsamaj ol tiaj, kiaj ili efektive estas, kaj ofte malaj al sia realo. Por atingi sukceson politike, oni devas resti en klara kvieteco, t.e. sekvi la principon de "senagado".)



Tio, kio estas plej perfekta, ŝajnas nekompleta,
Sed ĝia utileco estas nereduktebla.
Tio, kio estas plej plena, ŝajnas malplena,

Sed ĝia utileco estas neelĉerpebla.
 Tio, kio estas plej rekta, ŝajnas kurba;
 Tiu, kiu estas plej lerta, ŝajnas mallerta;
 Tiu, kiu estas plej elokventa, ŝajnas balbutema.
 Rapida moviĝo venkas malvarmon,
 Kvieta ripozo venkas varmon.
 Tiu, kiu restas en klara kvieteco, povas esti la
 ekzemplodona ĉefo sub la Ĉielo.

ĈAPITRO 46

(Laŭzi forte kontraŭstaras al la milito,
 opiniante, ke estas pli bone eviti ĝin, ol uzi
 armitajn fortojn. Li atribuas la militon al la
 homa nesatigebla avideco. Se oni nur estus
 kontenta pri sia situacio kaj avidus nenion,
 milito neniam okazus.)

Kiam la mondo estas regata laŭ la Taŭo,
 La militĉevaloj estas uzataj en terkulturado.
 Kiam la mondo estas regata kontraŭ la Taŭo,
 Eĉ gravedaj ĉevalinoj estas uzataj sur batakampoj.
 Nenia malfeliĉo estas pli granda ol la
 malkontenteco,
 Nenia kulpo estas pli granda ol la nesatigebla
 avido.
 Tial tiu, kiu estas kontenta pri sia kontenteco,
 Ĉiam estas kontentigita.



ĈAPITRO 47

(Laŭzi neas la valoron de la funkcio de
 praktikaj spertoj en la konado de la mondo kaj
 rekomendas kontempladon, t.e. enrigardon en
 sian menson. Laŭ li la fundo de la homa
 menso estas kvazaŭ klara spegulo, kiel
 menciite en ĉap. 10, spegulo, en kiu la ekstera
 mondo estas reflektita, tial per kontemplado

oni povas scii ĉion sub la Ĉielo kaj
 ekkompreni la Taŭon.)

Sen eliri el sia domo, oni povas scii ĉion sub la
 Ĉielo.
 Sen rigardi tra la fenestro, oni povas vidi la Taŭon
 de la Ĉielo¹.
 Ju pli malproksimen oni iras²,
 Des malpli multe oni scias.
 Tial la Saĝulo scias sen spertado,
 Komprenas sen vidado,
 Kaj faras plenumadon sen agado.

¹ “La Taŭo de la Ĉielo” aludas la leĝon, kiu regas la
 movojn de la suno, la luno kaj la steloj.

² T.e. for de la Taŭo. Ĉar la Taŭo estas ĝuste en
 la homa koro, tial estas neeble serĉi ĝin ekster la
 homa korpo.

Tradukita de **Wang Congfang**



IO

MODERNAJ POEMOJ

Kompreniĝo en Pluvo

Xi Murong

se pluvo sekvas pluvon
 se ĉagreno ripetadas
 bonvole lasu min vizaĝi al disiĝ' post
 la disiĝo
 ridete serĉi senrompите
 la neeble aperontan homon –
 vi

elĉinigris **Yang Li**

